Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI: 8-a de Marto 2016

Ĉeestantoj: Amri Wandel, Jehoŝua Tilleman, Matilda Landaŭ, Dror Gaon, Ŝlomo Ŝaĥar, Eldad Salzman, Eran Vodevoz, Lea Kudevitzki (parte), Gabi Zeevi.

Protokolo de la antaŭa kunsido (9-an de februaro 2016) – ĉu estas rimarkoj?

1. Nova klubejo

a) Jehoŝua laŭtlegas la leteron de Joela. Lea raportas pri la eblecoj. Ŝi kaj Joela esploris plurajn lokojn kaj trovis diversajn kaŭzojn por maltaŭgo. Laste: VICO ofertis akcepteblajn kondiĉojn kaj prezon, sed ne marde.

b) Kontrakto kaj pago al Bikurej Haitim: Amri sendis leteron al la instancoj kun kopio al Ariela – ankoraŭ ne alvenis reago.

2. Dratverejo kaj oficejo (Jehoŝua, Amri)

a) Kontrakto-renovigo la kun la vidvino: estas farita, subskribita, la gefiloj estas la garantiantoj. 4000 sikloj estas jam pagitaj (Jehoŝua pasigis al Ŝlomo), la pliaj estis ricevitaj en venontdatigitaj ĉekoj.

b) Serĉo de nova luanto (Eran akceptis, sed ankoraŭ ne agadis).

c) Gabi: mia filino luas en Bat Jam 50 m^2-an duĉambran loĝejon por 2850 NIS, eble interesiĝos pri la Dratwerejo. Se ne - mi petos ŝin anonci en "Jad2". *(intertempe mi eksciis ke ŝi ne volas lui ĝin, sed eble aĉeti. Eran aperigos anoncon por trovi luanton).*

ĉ) Serĉo de oficejo por aĉeti en Tel Avivo – Amri esploris, kaj havas konkretan oferton: 50 m^2 en la centro de TA (Rothshild-Balfour ang.) por 350 000 NIS, ankoraŭ ne komenciĝis la konstruo, organiziĝas por ĝi aĉetgrupo. Estos preta post du jaroj. Supozebla luig-enspezo: 4000 NIS monate. Urb-imposto ("arnona"): 1500 NIS monate.

Voĉdono: Amri daŭrigos la kontakton kaj interesiĝon – *la plimulto aprobas*. (*evidentiĝis ke estis eraro en la anonco kaj temas pri Petaĥ Tikva. La plej malalta ebleco por taŭga oficejo en TA estas momente ĉ. 600,000 NIS)*

3. Financoj (Ŝlomo)

a) Protokolo de la jarkunsido kaj estrarelekto devas esti sur nia oficiala papero, preta por prezento (formalaĵo).

b) Subvencio ELI por la KD de Ŝoŝia: ŝi kantos kaj faros la diskon. La sumo ankoraŭ ne estas konata. *Voĉdono: duono de la sumo, ĝis maks. 2000 sikloj (unuanime)*. Doron faras esperantajn subskribojn al filmo. Sugesto de Miĥal: repagi al li 80 siklojn. *(Unuanime).*

2/...

c) Kontista programo: Ŝlomo devas ekzerci per la programo. Li ricevis surloke kelkajn kvitancojn de Amri (por la ekspedo de IE) kaj Jehoŝua, li trejnoj per ili.

4. Estraraj taskoj

a) Komitatano A: Amri - post kvar mandatoj kiel komitatano B li ne plu kandidatiĝis por la elektoj kiuj okazis en Februaro. Sekve petas esti komitatano A, ĉar li pli ofte partoprenas en la UK ol Eran. Eran konsentas cedi kaj esploros la eblecon por komitatano C nur surloke dum la UK somere. Devas sendi leteron al la Ĝenerala Direktorino pri kandidatiĝo.
b) Kiel prezenti JELI en la Jarlibro? (Eran) Fakte ili ne aktivas! Eran kontraŭas skribi ke JELI provizore ne aktivas. Propono: redukti la raportitan nombron de JELI-membroj al 10 kaj ne mencii la nomon de la (delonge ne aktiva) prezidanto Joni.
Rilata afero: Amri parolis kun la patro de Daria kiu diris ke ili plu volas ricevi IE kaj pagos kotizon. Jehoŝua telefonos al la patro de Daria, kaj interesiĝos pri ŝi.
c) Respondeculo pri kontakto kun membroj (ĝis nun estis Lea). Amri telefonos al ŝi, kaj petos ŝin daŭrigi.
ĉ) Kotizo-memoriganto/kolektanto (ne nepre devas esti la kasisto!).
d) Respondeculo pri adreslisto kaj sendado de Israela Esperantisto: ĝis nun estis Lea kaj Joela. Propono: ni proponos al Jagil kontraŭ pago de jarkotizo. Samtempe ni serĉos ankaŭ en letero al la anaro sub la sama kondiĉo. *(unuanime aprobita!)*. Jehoŝua: ni havas ĉ. 90 membrojn en la listo, sed ĝi enhavas ankaŭ malaktivajn anojn. Individuaj israelaj membroj en UEA estas 17. Li pretigos la liston por la respondeculoj.
e) Komisiito por serĉado de nova klubejo: Eran pretas.
f) Ekstera (pagita) direktoro: (Ŝlomo) – tio ŝanĝus nian staton kiel asocio! – la ideo nuliĝas.
g) Miĥal ne volas resti plu en la estraro.
h) Amri sendos cirkuleron al la ELI-anoj, por peti volontulojn por tiuj taskoj *(farita)*

5. La 17-a Israela Kongreso (Amri)

a) Anonco aperis en la februara n-ro de la bulteno Esperanto, 1/16-a, sur la dorsa kovrilo.
b) Manĝo-mendoj: ĵaŭde vespere (restoracio en Jafo), vendrede tagmeze (restoracio en la Trajnstacio), vendrede vespere (en la hotelo – mendo ĝis 1.4), kaj sabate tagmeze (restoracio en Jafo). Amri sendos cirkuleron al la ELI-anoj, ke ili skribu al Jael pri siaj mendoj. *(farita)*

3/...

c) Programo: Amri dissendis detalan programon, ankoraŭ ne aperas surrete. Dror faros.
ĉ) Ekskursoj – dum- kaj antaŭ/post/kongresaj. Amri estis jam en Neve Cedek por ĉiĉeronada trejnado.
d) Partoprenantoj: Por AK – unu (Nelly). Hotelo mendita en Haifa. Por PK – 4 (du Kajtanoj, Nelly, unu belgo). Kun Renato – entute 5 eksterlandanoj.
e) La ĉambroj estas menditaj. Amri liberigis la superflue rezervitajn, kaj negocis 2 ekstrajn ĝis 1.4. 2016.

6. Israela Esperantisto

a) Amri dissendis 105 ekz. (vintro 2015) enlande kaj eksterlande. Super 50 ekz.: 30%-a rabatita tarifo. Entute kostis 593 NIS. Mankis 40 ekzempleroj – Dror alportis ilin al la kunsido, sed ili jam ne estos rabatitaj.
b) Amri ĝisdatigis la dissendo-liston en- kaj eksterlandan. Li pasigos la korektojn al Jehoŝua – telefone. (komentoj ankoraŭ ne enmetitaj en la etikedoj pro malkompreno – kelkfoje la skribo estis neciferebla).
c) Nova redaktoro estas serĉata! (Pagota: 1000 sikloj por unu numero). Ankaŭ enigi en la cirkulero al la membraro.
ĉ) N-ro 162 (somero 2016): ĉu estu memorlibro, aŭ ordinara bulteno?

7. Memorlibro pri Josi

a) Ĉu provi presi ĝin en la nuna formo ĝis lia datreveno (15.4), aŭ prokrasti por pli riĉa kaj ampleksa enhavo? Decido (akceptita): prokrasti ĝis junio (ĝis la Landa Kunveno).
b) Aldonaĵoj estas bonvenaj: artikoloj de Josi, judaj ŝercoj, fotoj.
c) Ĉu mola aŭ malmola kovrilo? (konsideroj pro kaj kontraŭ).

8. Jagil - li petis renovigi la sendadon de la ELI-listaj cirkuleroj. Li devus pagi per Enrika, ŝi konscias, sed ne sukcesis renkonti lin ankoraŭ.

La venonta kunsido: marde, la 5-an de Aprilo 2016, je 19:30

Protokolis: Gabi Zeevi